

Mond-kongreso en Interlaken por Monda Federala Konstitucio
Claude Gacond, 261-a radioprelego, 1968.10.09 & 12

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kiel observantoj por Radio-Svislando ni partoprenis interesan mond-kongreson en Interlaken fine de la monato aŭgusto.

A.- La celo de tiu kongreso estis la redaktado de Monda Federala Konstitucio. La angla titolo de tiu kongreso estis **World Constitutional Convention** kaj en la franca **Assemblée Constituante Mondiale**.

Cl.- Sed 5 kongresaj tagoj ne permesis eĉ ekdiskuti en la delegitara asembleo la temon mem de la kunveno. Tiu temo estas tro vasta kaj ne sufiĉe dekantika per redaktado de bazaj studoj, por povi esti pritraktita en kelkaj tagoj.

A.- Do delegitoj alvenintaj en Interlaken kun la ideo, ke ili revoluciigos la mondon, forlasis Svislandon kun ioma seniluziigo.

Cl.- Sed aliaj delegitoj kun malpli da iluzioj partoprenis tiun Kongreson. Kaj tutcerte ili forlasis Interlaken kun la impresoj, ke paŝo antaŭen al Monda Federacio estis farita.

A.- En Interlaken kunvenis de la 27-a de aŭgusto ĝis la 1-a de septembro du specoj de delegitoj. En granda Salono grupiĝis 150 delegitoj kaj observantoj sub la prezido de hinda reprezentanto. En tiu Asembleo oni multe parolis kaj nenion decidis. Tio ne signifas, ke tiu kunveno estis vana. Ĝi tutcerte permesis utilajn kontaktojn kaj konstruigajn interŝanĝojn de ideoj.

Cl.- En eta Salono grupiĝis 14 fakuloj : juraj spertuloj, gravaj politikistoj aŭ estroj de potencaj sociaj movadoj. Sub la prezido de la advokata moŝto Max Habicht, spertulo pri internacia kaj monda juroj, juristo jam ĉe Ligo de Nacioj kaj nun en Unuiĝinta Naciaro, tiu fakulo tutcerte efektivigis utilan laboron.

A.- En tiu fakularo troviĝis ekzemple la germana pastoro Martin Niemöller, prezidinto de la Ekumena Konsilantaro de la Kristanaj Eklezioj, ricevinto de la Lenin-pac-premio kaj la franca Abato Pierre, la fondinto de la Komunumoj Emmaus.

Cl.- Ni revenos poste al la laboro de tiu fakularo. Nun ni vidu el kiaj landoj venis tiuj kongresanoj. Laŭ niaj kalkuloj ĉeestis proksimume 150 reprezentantoj el 25 landoj. Bedaŭrinde reprezentantoj el komunistaj landoj forestis, eble pro la ĉeĥoslovakia invado, sed tre verŝajne, ĉar en tiuj landoj la mondanismaj ideoj ne estas oficiale agnoskitaj.

A.- Ni povis kontakti delegitojn el tiuj ĉi landoj : Belgio, Brazilo, Britio, kiu havis fortan kaj ageman delegacion, Cejlono, Danlando, Francio ankaŭ kun vigla delegacio, Ganao, Okcidenta Germanio, Hindio kun forta delegacio, Irano, Israelo, Italio, Japanio, Kanado, Kenjo, Kolombio, Meksikio, Nederlando, Niĝerio, Norvegio, Pakistano, Senegalo, Svislando kaj Usono, kun tre forta delegacio de 50 delegitoj, kiu formis do la trionon de la kongresanoj.

Cl.- Sin bazante sur tiuj delegitaroj oni konstatas, ke mondfederalismo estas plej disvastigita en Usono, Hindio, Francio kaj Britio. Legante la organojn de la mondfederalistoj oni ricevas la saman impreson, sed oni devas aldoni Japanion.

A.- La oficiala raporto disdonita al la ĵurnalistoj kaj radio-observantoj, inter kiuj ni troviĝis, nombris delegaciojn el 35 landoj kaj oficialajn reprezentantojn el Norvegio, Somalio, Ganao kaj Kenjo.

Cl.- La fakularo nomiĝis **Konsulta Konsilantaro**. Ĝi studis la rimedojn kapablaj instigi la registarojn, parlamentojn kaj popolojn partopreni al la starigo de Monda Konstituciantaro. Ĝi

Mond-kongreso en Interlaken por Monda Federala Konstitucio
Claude Gacond, 261-a radioprelego, 1968.10.09 & 12

ekzamenis diversajn projektojn de Konstitucioj de Monda Federala Ŝtataro. Ĝi fine redaktis memor-libreton por la registaroj de ĉiuj landoj kaj por la Unuiĝinta Naciaro, verko kiu sugestas la fondon de Monda Instituto pri Dokumentado kaj Serĉado por la Kreo de Monda Federala Aŭtoritato.

A.- Tiu laboro ŝajnas al ni pozitiva. Ni provos informi vin pri la rezulto de la kontaktado de la registaroj.

Cl.- Fakte ni troviĝas en ensorĉita cirklo. Se neregistaraj juristoj redaktas projekton de Monda Federala Konstitucio, la registaroj neniam akceptos sin submeti al decidoj faritaj sen iliaj konsento kaj kunlaboro.

A.- Sed aliflanke, se oni atendas, ke registaroj ekiniciatu kunvoki Mondan Konstituciantaron, oni devos havi longan paciencon. Neniam la registaroj akceptos mem iniciati la sendon de delegitaroj al Kongreso, kies tasko estos la limigo de la naciaj suverenecoj.

Cl.- Do la provo fondi Instituton kun la helpo de la registaroj ŝajnas al ni taŭga politiko. La Konsulta Konsilantaro kalkulis, ke por povi efike labori, tiu Instituto devos povi disponi pri po unu miliono da dolaroj jare. Ni esperas, ke la advokata moŝto Max Habicht kapablos konvinki kelkajn registarojn subvencii tian Instituton.

A.- Se tiu Instituto povos esti kreita, granda paŝo al Monda Federala Aŭtoritato estos farita.

Cl.- En Interlaken multaj delegitoj kaj observantoj ne komprenis la utilecon de tiu Konsulta Konsilantaro. Tiu nekomprene esprimiĝis en la sesioj de la **Asembleo de la delegitoj**. Ŝajnas, ke kelkaj delegitoj estis iom ĵaluzaj ne esti elektitaj por partopreni la laboron de la **Konsulta Konsilantaro**.

A.- En tiu vasta Asembleo la neceso uzi du labor-lingvojn : la angla kaj la franca, certe malrapidigis la debatojn kaj malfaciligis la rilatojn inter la kongresanoj. Ni konstatis la ĉeeston de pluraj delegitoj kapablaj sin reale esprimi nek en la angla, nek en la franca.

Cl.- Ni do konstatas, ke en similaj kongresoj, kiuj ne disponas pri la necesaj financaj rimedoj por dungi aron da interpretistoj kaj tradukistoj, la dulingvismo kondukas al babelismo.

A.- Pro tio, kiam la svisa observanto Jacques Mühlethaler, la prezidanto de la Monda Asocio por la Lernejoj Instrumento al Paco, sin esprimis favore al internacia helpa lingvo kaj por esperanto, li estis forte aplaŭdita de la angla kaj de la franca aŭdantoj.

Cl.- Oni do povas konstati, ke la bezono de esperanto kreskas. Inter alie la procento de esperantistoj en similaj aranĝoj ankaŭ kreskas. Ni renkontis en tiu kongreso dekduon da lertaj esperantistoj.

A.- Kaj ni konstatis ĉe la afrikanoj kaj azianoj grandan interesiĝon por esperanto. Ili eksentas, ke mondfederacio ne kreiĝos helpe de la lingvoj de du potencaj landaroj.

Cl.- La venontan semajnon ni prezentos al vi iom detale la laborojn en tiu Asembleo de la delegitoj.

A.- Temis pri Mond-Kongreso kunveninta fine de aŭgusto en Interlaken por labori al la redaktado de projekto de Monda Konstitucio.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-